

Alfabetoj en Etnaj Lingvoj kaj en Esperanto

Gerard Cool

Leitringerstr. 53., A-8430 Leibnitz, Aŭstrio

1. Pluraj skribaj lingvoj havas du aŭ eĉ tri alfabetojn, la signan, la sonan kaj ofte la literuman.

La signa alfabeto estas la vico aŭ sinsekvo de la literoj, en esperanto do a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v kaj z. La sona alfabeto konsistas el sonoj, per kiuj oni nomas la literojn. Esperante do "a", "bo", "co", "ĉo", ..., "u", "ŭo", "vo" kaj "zo", ĝis nun. Evidente do Zamenhof sentis en literoj - kiel en ĉiuj signoj, simboloj, nomoj - substantivojn, kiujn li opiniis devi signi per la finaĵo -o.

Esperanto ne havas oficialigitan literuman alfabeton, sed pluraj (multaj) etnaj, skribaj lingvoj havas tion. Ĝi konsistas el longetaj vortoj, ofte trisilabaj, kiuj vortoj komenciĝas per la responda litero.

2. La rolo de la signa alfabeto estas, vicigi ĉiujn uzatajn literojn.

La celo de la sona alfabeto estas, aŭdigi la literojn, se ne eblas la videbla signado. La celo de la literuma alfabeto estas literumi vortojn aŭ frazojn, se ne eblas, videbligi ilin, kaj se la aŭdeblo, pere de la sona alfabeto, estas malfavora, kiel ekz. ĉe telefonado.

La fakto, ke multaj el la skribaj, etnaj lingvoj havas oficialan literuman alfabeton apud la sona, fakte atestas pri la maltaŭgeco de la sona alfabeto por tiu rolo.

3. Tiu maltaŭgeco devenas precipe de la fakto, ke ĉiam ekzistas sufiĉe multaj paroj, eĉ pli (opoj de simil)sonaj konsonantoj, kiuj krome en tiu son-alfabeto havas la saman, vokalan finaĵon (ekz. l-r, d-t, b-p, m-n).

En la son-alfabeto de esperanto tiu malfacila distingeblo estas eĉ pli drasta ĉar, escepte de la kvar vokal-signoj a, e, i, u ĉiuj ceteraj literoj de la "zamenhofa" son-alfabeto finiĝas per la vokalo o, dum pluraj etnaj son-alfabetoj ofte varias iom (:s-z, f-v ...).

4. Se esperanto ludos estonte iam pli gravan rolon, ankaŭ science, ĝi nepre devas alpreni taŭgan son-alfabeton, kaj al ĝi paralelan, taŭgan literuman alfabeton. Ja en multaj sciencoj, kaj tute speciale en la matematiko, tre grave rolas simboloj, signoj, por kiuj oni elektas ĉiam literon de la propra alfabeto, sed ne nur: ankaŭ literoj de la greka alfabeto,

kaj multaj alispecaj literoj kaj signoj estas daŭre uzataj en la matematiko. Kaj ĉiam sentatas la bezono, ankaŭ laŭtlegi ilin, ankaŭ se tiuj simboloj (literoj), estas videblaj. Oni pensu pri formuloj, ĉe kiuj neniam sufiĉas skribi (legi) ilin, sed kiuj ankaŭ postulas laŭtlegado. Kaj tia laŭtlegado estas eĉ maltaŭga en gravaj, sciencaj, etnaj lingvoj, sed en esperanto, kun la monotona kaj malfacile distingeblaj sonoj, eĉ pli draste maltaŭga.

5. Pluraj esperantistoj jam faris proponojn por nova son-alfabeto esperanta, i.a. G. Waringhien, kiu estis longan tempon prezidanto de la Akademio.

Ĉe multaj esperantistoj certe stariĝas la demando, ĉu propono al nova son-alfabeto estas kontraŭ-fundamenta. Por mi mem estas eksterdube, ke Zamenhof mem en la nuna stadio, estus por la enkonduko de pli taŭga son-alfabeto. Li ja ĉiam montris flekseblan, prudentan menson. Kaj li certe bone povus distingi sinceran proponon plibonigan sur akcesora kampo kaj reform-projekton de la tuta lingvo.

Sed ankaŭ teorie, filozofie, oni povus demandi sin, ĉu signoj, simboloj, nomoj, ... literoj, vere estas memkompreneble aĵoj, objektoj, substantivoj. Diskutoj pri geografiaj nomoj montras, ke eblas ankaŭ la opinio, ke nomoj mem ne necese estas konsiderendaj substantivoj. Ankaŭ mi opinias, ke ne (+ oni legu "plus" kaj ne [nepre] "pluso", k.t.p.).

Nu, 27 literoj (latin-tipaj) de la esperanta alfabeto kaj 4 ceteraj latin-tipaj literoj q, w, x, y kaj multaj aliaj simboloj estu prononcendaj klare kaj koncize. Kial ne uzi ĉe tiuj finaĵoj, elekteblan el niaj 5 vokal-finaĵoj a, e, i, o, u kiuj 5 finaĵoj atendas helpoprete taŭgan, bone pripensitan aplikon por son-alfabeto esperanta ?

6. G. Waringhien do faris proponon de son-alfabeto kun nur la finaĵoj o kaj a, defendante sian proponon "aŭdacan" per la rimarko, ke Zamenhof mem foje metis en adjektivon ion substantivan (!). Certe du vokaloj ne sufiĉas, eviti ĉiujn distingajn problemojn. Aliaj proponintoj klopodis, pliproksimigi la zamenhofan son-alfabeton al kelkaj gravaj etnaj son-alfabetoj. Tiurilate eble Frederik Belinfante faris la plej kompletan proponon atingante preskaŭ plenan "komunan nomanton" de pluraj (multaj [?]) eŭropaj, latinliteraj lingvoj. Interesa klopodo, certe. Sed miaopinie neniel solvonta la veran problemon, kaj neniel elutiliganta la eblon de distingado pere de 5 vokaloj.

7. Kiujn kondiĉojn devas plenumi senca, taŭga, esperanta son-alfabeto nova ?

a) Antaŭ ĉio: ĉiu paro aŭ pli-opo da simil-sonaj konsonantoj devas havi malsamajn vokal-finaĵojn.

b) Ne nur ĉe la 27 literoj de la esperanta (signa) alfabeto. Sed devus

esti integrita en tia distingosistemo ankaŭ la grekaj literoj,... ĉar la plur-silabaj liter-sonoj grekaj ("alfa", "beta" k.t.p. ... mi konsentas ĉefe kun la tiurilataj proponoj de Belinfante) neniel povas konfuziĝi kun la unu-silabaj sonoj de esperanta son-alfabeto, gravas la unusilabaj liter-nomoj grekaj (notu cetere, kiel multaj esperantistoj en matematika uzo preferas diri "alfa", "beta", "gama", ...).

c) Sed ankaŭ aliaj gravaj signoj kaj simboloj el la matematiko, precipe se ili kutimas signiĝi per literoj, estu integritaj en la komplekso de bone distingebla sonaro. Tiel ekz. la signoj de aroj de gravaj nombro-specoj.

8. Tiuj plej gravaj nombroj/aroj havas mondscale konatajn signojn, nome "stiligitajn" literojn $\mathbb{N}$, $\mathbb{Z}$, $\mathbb{Q}$, $\mathbb{R}$, $\mathbb{C}$.

$\mathbb{N}$ signifas aron de la naturaj nombroj aŭ numeroj 1, 2, 3 ...

$\mathbb{Z}$ enhavas la antaŭan aron krome la entjerajn, negativajn nombrojn kaj 0 (mi ne scias kial ilia simbolo estas mondscale stiligita per $\mathbb{Z}$).

$\mathbb{Q}$ signifas la aron de la racion(al)aj nombroj aŭ racioj. Raciona nombro estas notebla kiel kvociento de du entjeraj nombroj, tial la entjeroj esta ankaŭ racioj (la stiligita $\mathbb{Q}$ certe devas memori al "kvociento", kiu vorto en pluraj okcidentaj lingvoj komencigas per Qu).

$\mathbb{R}$ signifas la aron de la reelaj nombroj. Reel(a nombr)o estas nombro kiun povas reprezenti punkto sur la "reelo-rekto". Do ĉiu racio estas reelo, sed ekzistas tre multaj reeloj ne-racionaj. Klasika ekzemplo estas $2^{1/2}$. Ankaŭ pi estas fama ekzemplo de neraciona reelo.

$\mathbb{C}$ signifas la aron de la kompleksaj nombroj, kiu havas la formon $x + yi$, en kiu x kaj y estas reeloj kaj i reprezentas la stangan nereelan ideon $(-1)^{1/2}$.

Por tiuj 5 nombroaroj mi en matematikaj proponoj jam rekomendis jenajn prononcojn: $\mathbb{N}$ estu prononcata "Num" (pro numero); $\mathbb{Z}$ "Zent" (pro la signo $\mathbb{Z}$ kaj la vorto entjero); $\mathbb{Q}$ "Kvo" (pro la pronoco kvociento); $\mathbb{R}$ "Re" aŭ eĉ "Rel" (pro reelo kaj la bildo de relo taŭgas bone por reelo-rekto); $\mathbb{C}$ "Comp" (por kombini la signon $\mathbb{C}$ kun la vorto kompleksa nombro).

Krome mi ŝatas aldoni ankoraŭ la signon Cif kun la prononco "Cif" por la aro de niaj ciferoj 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 0 kaj la signon P kun la pronoco "Prim" pro la aro de prim-nombroj.

Mia propono esta videbla en la Tabelo pri son-alfabeto nova, ne nur de la alfabeto esperanta, sed ankaŭ de aliaj signoj unusilabaj. Ekz. mi proponas por la esperanta litero "k" la sonon "ka" kaj por la latina litero neesperanta "q" (kiu ĉiam sonas ankaŭ k [kune kun ŭ]) la sonon "ku". En unu linio vi vidas la esperantan literon "r" kun la sono "ri", la respondan literon grekan "ro" kun la sono "ro" kaj la matematikan simbolon $\mathbb{R}$ kun la

Liter-signo	Proponataj nomoj			Grekaj literoj unusilabaj		Matematikaj signoj	
	sona	literuma	ceteraj ebloj	signo	prononco	signo	sono
a	a	arda	aĝa akra				
b	be	bele	beste				
c	ci	citi				Cif/C	cif/comp
ĉ	ĉa	ĉarma	ĉasta				
d	di	diri	distri dikti				
e	e	ege	eĥe				
f	fu	flugu	fuĝu flustru	ϕ	fi		
g	go	golfo	golo gorgo				
ĝ	ĝe	ĝene	ĝeme				
h	haŝ	haŝta					
ĥ	ĥo	ĥoro	ĥloro	χ	ĥi		
i	i	iri					
j	jo	jodo	jono jogo jodlo				
ĵ	ĵu	ĵuru					
k	ka	kara	klara				
l	lu	ludu	lumu luu luktu				
m	me	meze		μ	mu		

n	no	nombro	nomo nodo Nordo	ν	nuj	N	num
o	o	ordo	ondo oro osto				
p	pu	plugu	pluku puŝu pluvu	π	pi	P	prim
r	ri	ridi	rimi riski	ρ	ro	R	rel
s	sa	sana	saĝa sankta				
ŝ	ŝo	ŝoko	ŝovo				
t	te	tere	tempe tede	τ	taŭ		
u	u	uzu	urĝu				
ŭ	ŭe	ŭeste	(okci- dente)				
v	va	varma	vasta vana				
z	zi	zipi				Z	zent
aŭ	aŭto	aŭto- mobilo					
eŭ	eŭro-						
Ceteraj latinaj literoj							
q	ku					Q	kvo
w	vava						
x	iks			ξ	ksi		
y	i- grek						

sono "Rel". Prononcante ne simple "ro", sed "ri" aŭ "rel" oni klarigas al la aŭskultanto, ke oni celas la signon r, aŭ ro aŭ R.

9. Jen kelkaj komentoj por mia proponaro. Mi opinias, ke ĉiukaze, kiam la nura pronoco de konsonanto de esperantaj literoj, ceteraj latinaj literoj kaj de signoj de gravaj nombroaroj povus iel konfuziĝi kun alia(j), se la sono havus la saman vokalan finaĵon -o, mia proponaro havas malsamajn vokalajn finaĵojn.

a) Ĉar pluraj latinidaj lingvoj ja havas la literon "h", sed ne prononcas ĝin, la zamenhofa son-alfabeto malfacile distingas la sonojn por litero "h" kaj "o" en latinida (ekz. franca) buŝo. Mi elektis unue por "h" la sonon "ha". Sed tiam validus la supre dirita por la literoj "ha" kaj "a". Tial mi aldonis post "ha" kiel sola escepto, "s", iom simile al franca literosono "has" aŭ fakte "as". Kaj feliĉe mi trovis bonvenan paralelan literuman vorton "hasta".

Preskaŭ ĉiuj lingvoj kun la literoj "m" kaj "n" malfacile disting(ig)as ilin prononce. Kaj pluraj aziaj lingvoj tre malfacile disting(ig)as la literosonojn "l" kaj "r". Kaj slav-lingvanoj inklinaŭ prononci la literosonojn "h" kvazaŭ "ĥ", do havas problemojn disting(ig)i la literosonojn "h" kaj "ĥ". Same malfacile pluraj german-lingvanoj povas disting(ig)i la sonojn "ŭ" (kiel komenca litero, ekz. en ŭato), "v" kaj la latina sed ne esperanta litero "w". (Cetere ĝi nomiĝas, ekz. en la angla "duobla v". Kaj tute paralele kun tio, mi proponas la literosonojn "vava" por "w", kiel estas cetere ankaŭ la kutimo en fonetikaj rondoj).

Tial mi elektis en ĉiuj tiuj kazoj malsamajn vokalajn finaĵojn: me - no; lu - ri; a - has - ĥo; va - vava (w) - ŭe.

b) La ceteraj paroj de malfacile distingeblaj konsonant-paroj estas dispartigeblaj laŭ kelkaj grupoj (I ĝis IV).

Grupo I

entenas la

konsonant-

parojn kiuj

diferencas nur

per la

(ne)voĉeco:

Grupo II

enhavas la

parojn kiuj

diferencas nur

per tio, ke ili

komenciĝas per la

"eksplozaj" sonoj "d" aŭ "t",

aŭ ne.

Grupo III

entenas parojn kiuj

senvoĉa	ĉa	fu	ka	pa	sa	ŝo	te
voĉa	ĝe	va	go	be	zi	ĵu	di

sen t	ĵu	sa	ŝo
kun d	ĝe	ci	ĉa


svelta	ci	sa	zi
dika	ĉa	ŝo	ĵu

diferencas nur per tio, ke la konsonanta sono estas "svelta" aŭ pli "dika".

Grupo IV enhavas parojn, kiuj ne nepre tre similas prononce, sed laŭvide, nome, ĉu ili havas supersignon ^ aŭ ne.

sen ^	ci	go	has	jo	sa
kun ^	ĉa	ĝe	ĥo	ĵu	so

Jen estas skizita la tuta sistemo de la problemaj distingeblaj.



Ĉiu streko indikas unu tian problem-rilaton. Kelkaj paroj havas eĉ en si du tiajn rilatojn. Kaj estas unu tuta bloko kun dek konsonantoj, plena je tri rilatoj !

c) Kiel vi vidas: ĉiu problema interrilito inter konsonant-paro aŭ eĉ -pliopo havas malsaman prononcon je la fino, do estas bone distingebla. Eĉ ĉiu paro el la "bloko de 10", kiu havas interriliton nur unu tra l'altra (do nerekte, probleman interriliton) havas malsamajn vokalfinaĵojn, kun la escepto de ci -(sa) - zi kaj ĉa - (ŝo) - sa aŭ ankaŭ ĉa - (ci)-sa. Sed ĉe iel zorga prononcado tiuj du paroj de konsonant-sonoj tamen estas nepre distingeblaj. ĉ) Sed ne nur tiu proponata son-alfabeto tiel ĉi distingas alie ne facile distingeblajn konsonant-pliopojn, sed ĝi ankaŭ distingas parojn aŭ pliopojn de signoj, kiuj estas inter si respondaj, kaj ofte ja prononciĝas (praktike tute) egale:

x-iks	c-ci	f-fu	ĥ-ĥo	k-ka	m-me	n-no	p-pu	r-ri	t-te	z-zi
ĝ-ksi	Cif-cif	φ-fi	χ-ĥi	q-ku	μ-mu	ν-nuj	π-pi	ρ-ro	τ-taŭ	
	C-comp			Q-kvo		N-num	P-prim	R-rel		Z-zent

La literoj de la antikva greka alfabeto estas instruataj pli-malpli unuece: alfa, beta, gama, delta, ... pi, ... Tiel mi konsilas ankaŭ legi ilin en (matematika uzo de) esperanto, do ĝenerale kiel konsilas Belinfante. Sed por μ kaj ν li proponas la prononcon "mi" kaj "ni", kio estas miaopinio plur-rilate maltaŭga. Ili estas memstaraj esperantaj vortoj; inter si same malbone distingeblaj kiel "mo" kaj "no"; kaj evidente estas la son-traduko de la sono "u" (franca, nederlanda), ŭ (germana). Almenaŭ en miaj gepatraj lingvoj oni lernis uzi por μ kaj ν tiun sonon. Kaj la esperanta "i" estas tre maltaŭga traduko por tiu por tiu sono "ü". Tial mi proponas la sonojn "u" (esperanta) sed por distingi "mu" kaj "nuj".

d) Eĉ la sep konataj unusilaboj do, re, mi, fa, sol aŭ so, la, si aŭ ti, kiuj signas la notojn de la maĵora ton-skalo (en pluraj lingvoj absolute, en aliaj lingvoj relative), do eĉ tiu 7 unusilaboj distingeblas de la liter- kaj signosonoj kun la koresponda konsonanto (se oni elektus por R "rel").

Malpli gravaj avantaĝoj de mia propono ol la kvin supraj estas ankoraŭ la jenaj:

e) La vokal-sinsekvo de "mia" son-alfabeto estas varia. Estas nur unu sinsekva paro sam-vokala: no - o.

f) El la "Belinfantismo" mi lasis la du sonojn, kiuj estas plene komunaj el la latin-alfabetaj lingvoj, "ha" kaj "ka". Nur "ha" mi ŝanĝetis al "has", kio ŝajnas al mi eĉ pli favora.

g) La distribuo de la 5 vokalaj finaĵoj laŭ la 27 esperantaj literoj estas maksimume "homogena":

a	e	i	o	u
ĉa	be	ci	go	fu
has	ĝe	di	ĥo	ĵu
ka	me	ri	jo	lu
sa	te	zi	no	pu
va	ŭe		ŝo	
6	6	5	6	5

ĝ) La zamenhofa son-alfabeto enhavas du memstarajn vortetojn, do kaj po. "Mia" son-alfabeto enhavas, escepte de la jam arkaikiĝinta ci, neniun memstaran vorton. Sed (nur) tri vort-radikojn, di(o), lu(i), te(o).

h) La specialan literon ŭ mi traktis memstare, kiel en la vorto "ŭato"; krome kiel ero en la du diftongoj kun ĝi, aŭ kaj eŭ.

ĥ) Sed fakte la kerno de mia proponaro estas la literuma alfabeto, kiu estas plene paralela aŭ respondanta kun la proponata son-alfabeto, kaj kies rolo kaj signifo larĝe superas la ĝeneralan rolon, tiun de pli distingebla son-alfabeto. Fakte la sona kaj literuma alfabetoj, tiaj kiel proponataj, estas unuo, ĉe kiu

la literuma alfabeto havas fakte la ĉefrolon subteni la sonalfabeto(-parkerigado)n.

10. La proponata literuma alfabeto

Ĉiu literuma vorto konsistas el du silaboj, kies vokaloj estas egalaj, kaj egalaj kun la vokalo de la responda liter-sono. Tial do ĉiu el la literumaj vortoj rolas kiel adjektivo, adverbo, (verba) infinitivo, substantivo aŭ (verba) u-modo. Mi ne elektis la vortojn laŭ kategorij, kiujn ili laŭ PIV havas. Sed mi provis elekti la vortojn el sufiĉe konataj, oftaj vortoj en sufiĉe "naturaj" roloj aŭ funkcioj. Foje mi ne sukcesis trovi tian vorton plej konatan, en plej natura rolo. Responde al liter-sono "has" venas en konsideron fakte nur "hasta", kiu ne estas tre ofta. La vortoj "ĥoro" ankaŭ "ĥloro" (kemia elemento) estas malnoviĝintaj. Responde al "ŭe" mi trovis nur neologismon "ŭeste" (=okcidente). En PIV estas menciita la vorto "uesto" kiel sinonimo kun okcidento. Sed "ŭesto" kondukas miaopinie al pli ĝusta prononco.

(Cetere la enkonduko de la alternativoj "eosto" kaj "ŭesto" apud la malnovaj oriento kaj okcidento estas salutinda laŭ mia opinio. Unu el la avantaĝoj estus ekz. ke la vorto "orientiĝi" havus nur unu signifon, "sin trovi en iu situacio").

Responde al "zi" mi elektis "zipi", kvankam tiu i-formo eĉ ne menciigas en PIV. Tamen ŝajnas al mi memkompreneble, ke zipo estas fermilo kiun oni nepre fermu aŭ malfermu. Kaj tiu manipulado do estas "zipi".

Al la oficiala son-alfabeto mi aldonis la diftongo-sonojn "aŭ" kaj "eŭ", al kiuj mi ne povis trovi duan silabon kun la sama sono. Mi elektis la oftan mallongigon "aŭto" por "aŭtomobilo"; kaj la pseŭdoafikson "eŭro-" en la senco de "eŭropa". Al la latinaj literoj ekster-esperantaj mi ne serĉis literumajn vortojn, ĉar la sonoj de la proponataj sonoj jam estas sufiĉe apartaj.

En la plej multaj kazoj mi ne nur trovis, responde al iu liter-sono, taŭgan literuman vorton, sed eĉ du aŭ pli da ili. Tiukaze mi mem faris elkon el ili, sed menciis ankaŭ la ceterajn, por ke la leganto mem esploru, ĉu la vorto elektita de mi estas la plej taŭga. Ĉe elektado oni povas konsideri kaj "pesi" plurajn kriteriojn, i.a la klaran prononcon, la "naturecon" de la vorto kaj ĝian funkcion; eble eĉ la "pozitivecon" de la signifo k.t.p.

11. Mi venis al la ideo strukturi la literuman alfabeton proponatan, ĝuste por ke la akceptiĝo far kiom eble plej multe da esperanto-uzantoj fariĝu praktike ebla. Kaj por tio necesas, ke la parkerigo de la son-alfabeto estu ebla al multaj esperantistoj kun relative malmulta peno. Mi mem spertis, ke por tio literuma alfabeto proponita de mi (almenaŭ iu same strukturita) tre grave helpas. Kvankam mi ĉiam havis malbonan memor-

kapablon, kaj kompreneble nun, post la emeritiĝo eĉ mizeran memoron, mi tamen sukcesis relative facile parkerigi "mian" literuman kaj son-alfabeton.

12. Ke tiun proponon elkovis matematikisto, ne estas hazardo. Eble sur tiu kampo la ĝeno de malfacila distingeblo kaj monotoneco de daŭra uzado de literoj kaj aliaj signoj estas plej senteblo kaj sentata. Tial ja multajn ekzemplojn mi prenis el la matematiko. Tiel ankaŭ en la proponata literuma alfabeto sentiĝas verŝajne la influo de matematiko(: nombro, ordo...). Tamen mi neniel opinias, ke nur por matematiko gravus pli taŭgaj alfabetoj. La argumentoj por ili en ĉiutaga lingvaĵo estus la samaj.

13. Mi estas konvinkita, ke mia propono estas bone pripensita kaj havas klarajn avantaĝojn. Kompreneble ĝi ne estas senmanka. Tial mi nepre alvokas la leganton nepre reagi kaj komenti ĉi tiun proponon.